



3(148)
2014

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Eli Urbanová * 1922

Inter ni inoj

Li min avertis: Pensu pri mi,
sed ne sur strato, ne sur strato,
aŭ mi koleros kaj vin batos!

Inter ni inoj – ba, li blagas.
Ja mi ne riskos mian hau ton
kaj ne transiros antaŭ aŭtoj!

Kiam mi ĉesos uzi ŝminkon?
Tuj kiam li sin ĉesos razi!
Ĝis nun nenia ŝanĝ' okazis ...

Inter ni inoj – mi apenaŭ
aspektos kiel Greta Garbo
kaj li apenaŭ portos barbon ...

Se li almenaŭ ne demandus
kun evidenta ironio,
ĉu mi jam zorgas pri linio?

Inter ni inoj – kio kaŭzis,
ke mi obezas? Pizo? Rizo?
Mi scias kio – dolĉaj kisoj!

Kaj li severe min admonas
kaj li sindone min karesas ...
Eĉ morti al mi malpermesas!

Inter ni inoj – li min amas.
Mi lin komprenas, ne, ne miras,
nur iam tiam al mi diras:

Eli, ne lasu vin seli!

Viro de ago

Laŭdire kio via mi estas?

Li ĝisatendis ĉi respondon:
– Vi estas mia tuta mondo,
mia riĉaĵo, dolca predo,
mia burĝono, bela bebo ...
Kaj li aŭskultas kaj en fino
degelas kiel virgulino ...

Laŭdire kio via mi estas?

Mi jam kutimis ludi rolon
de konkeranto. Per paroloj
provas parade lin eksciti.
Mi ne kuraĝus ilin citi ...
Ja tiuj faris el li ulon
bonpreparitan por kopulo ...

Laŭdire kio via mi estas?

Pasioj pasis. For imagoj.
Rigardu lin! El vir' de ago
estas denove dolĉa predo,
mia riĉaĵo, bela bebo ...
Dum li ronketas, mi konscias,
ke li min ĉefe emocias ...

Laŭdire kio via mi estas?

Fino de erotika poetino

Pri kio mi meditas?
Ba, pri nenio ... Pri la vivo ...
Ĝiaj diversaj logaĵoj ...
Mi venis al jena konkludo:
Viv' estas lukto, ne ludo.

Ĉu vi ŝatas alkoholon?
Ĉefe ne kaŭzu karambolon!
Alia pretas lastan monon
doni por drogo. Lia risko!
Ankoraŭ pli min ŝokas homoj,
kiuj foriron el la mondo
solvas per salto desur ponto.
Hej! Haltu! Ja ne havas sencon
el ĉio fari tuj sciencon ...

Tamen kia estos fino
de erotika poecino?
Mi simple palpos en la ŝrankon,
klare, ke ne por revolvero,
ekkuŝos eble sur la plankon ...
Tion mi diras ĝusta ĝuo!
Ulo min tiel ne detruos!
Kaj daŭros tiu ĉi bonfarto
laŭvorte „senza” ĝis inkvarto ...

Pri kio mi meditas?
Ba, pri nenio ... Pri la vivo ...
Ĝiaj diversaj logaĵoj ...
Mi venis al jena konkludo:
Viv' estas lukto, ne ludo.



Pri virino simbole

Simbolo estas signo anstataŭanta difinitan objekton aŭ abstraktan nocion, okazintaĵon k.t.p. kaŭzanta en la menso emocion, bildigon aŭ travivaĵon kunligitajn ĝuste kun ĉi tiu objekto. Simbolo funkcias surbaze de komprenata de ĉiu kontrakto, sen kiu ne ĉiam klara kaj unusignifa ilia bazo fariĝus komplete nekomprenebla.

Nocion **simbolo** oni aplikis en diversaj signifoj. Ĝis nun ĝi estas ideo multsignifa. Krom signoj konvenciaj kiel standardoj, blazonoj, literoj, ciferoj, signoj matematikaj, vojaj, fabrikaj ekzistas pli interesaj signoj de objektoj, nocioj, bildigoj, travivaĵoj kunligitaj kun la ena rilato, kunsonantaj, elvokantaj asociaciojn kun la alia objekto aŭ nocio.

En la samaj aŭ parencaj kulturoj aŭ religioj iuj objektoj, vortoj kaj signoj igis en la mensoj, sentoj kaj imagoj de la antaŭuloj aliajn objektojn, vortojn kaj signojn. En ĉi tiu aperaĵo ne gravas veraj ligoj inter ĉio ĉi, sed kredo kaj asociado. Ne ĉiuj simboloj estas sendubaj kiel en nia kulturo reĝo-leono, ruzulo-vulpo, ŝtelistino-pigo. Ĉio, kio simbola estas ne difinebla, multtavola, fluanta, flagranta, plena de kontrastoj, do des pli alloga kaj interesa por esploristoj.

Oni skribis kaj verkis pri virino diversmaniere, bone, malbone, gaje. Ĉi-foje mi volas proponi la trarigardon de la plej oftaj konvinkoj pri virinoj, kiuj funkcias plej parte simbole de antikveco ĝis nun.

Ni komencu de objektoj, kiuj simbolas virinon kaj kiuj estis konataj multe da jarcentoj antaŭ fama Sigismondo Freud. Simbolas ŝin objektoj konkavaj, kavigitaj, enpremitaj, malplenaj, kiel ekzemple **arko, groto, krusto, vazo, pokalo, pordego, huffero, kruco kun prenilo** aŭ *crux ansata*, egiptia signo *ankh*, objektoj rondaj kaj ovalaj, ekz. **perlo, ovo, ŝildo, monero, pelvo, plado**, objektoj horizontaj, do ekz. **akvo, maro, tero, angulo, triangulo, kaŝejo** (anguleto), **elfuejo de rivero, piramido**, objektoj malfermitaj, ekz. **aperta manplato, truo, puto, folio de mirto** dediĉita al diino Afrodita, la nupta **mirta florkrono**, diversaj **fendoj** ekz. en roko, **sulko, foso, glavingo, labirinto**, objektoj onde enpremitaj kiel **sinusoido, kato, bovinaj kornoj, sepo de la Luno, monteto, fiŝo**, estaĵoj fekundaj kiel **bovino, kolombo, leporo, pasero, frukto de granato**, ĝenerale ena flanko de objektoj kaj situacioj.

Virino ligita ĉefe kun Tero kaj Luno reprezentas principon negativan, pasivan kaj kiel ofte okazadas portas laŭ konvinkoj de diversaj tempoj kaj lokoj ecojn variajn kaj kontrastajn. Virino simbolas Teron-Patrinon, fekundan kaj gravedigitan de vira Ĉielo aŭ Suno, ricevantan de ili necesajn por vivi lumon kaj pluvan akvon, dependan de la vira elemento, humilan, orgojlan, kvietan, spertantan danĝerajn skuojn. Ĝi povas esti aŭ bonvola aŭ detrua la vivon, kiun ĝi mem kreas. Ĝi scipovas esti samtempe virgulino kaj kelknaskintino, ĉasta kaj malĉasta, majstrino de sorĉoj kaj magio.

Virinon oni identigis kun Grand-Patrino, la gepatra lando kaj Patrino-Naturo parenca al senforma Kaoso, balbutanta per marondoj. Ŝi estis ekvivalento de subkonscio, de biblia prapatrino Eva, amoral, primara, neracia, naskita post viro, kiu instigis lin formanĝi la nepermesitan frukton. Tiamaniere ŝi atingis sian malkonscian celon, malproksiman de la stabila senmova edeno kaj fariĝis en ĝuo kaj doloro portantino de la nova vivo.

Eva kaj Maria – la tema kunmetaĵo precipe fruktodona en arto de la romanika tempo-periodo apogita je la vortludo Eva kaj Ave enhavas kontraston inter falo de Eva kaj savo de Maria, la Dipatrino de Kristo-Savanto.

La **naskanta virino** bildigas ĉian komencon. En multaj eksaj kaj nuntempaj religioj specialan rolon plenumadis virgulinoj-patrinoj, zorgantaj pri virinoj, edzeco kaj amo. Al ili apartenis helena Afrodita kaj Artemida, romaj Venuso kaj Diano, prasemida Astarto, fenica Iŝtar, kelta Danu (Anu, Dana). Patrino-Tero, diino de la virina principo ankaŭ havis siajn reprezentatinojn sur terenoj de helenoj – Gaja, Demeter, Kora kaj Hera, en Romo Ceres, egiptiaj Hathor kaj Isis, hinda Lakŝmi (diino de belo kaj feliĉo, edzino de Viŝnu), Tanit el Kartago bildigita en Azio kiel ursino, en Ĉinio kiel tigrino, en Egiptio – bovino, en Grekio – porkino kaj en Romo kiel lupino.

Virino estas **kruela**. Artemida mortigis per arkaj sagoj infanojn de Niobe. Hera persekutis konkubinojn de Zeuso kaj iliajn idojn, Atena minacis al ĉiuj per lanco. Gorgonoj – tri fratinoj, inaj monstroj de helena mitologio elpaŝas en la arto kun flugiloj kaj haroj el serpentoj. Ilia vido igis la ŝtoniĝon de observanto. Al la plej danĝera el ili, Meduzo detranĉis la kapon Perseo. Esploristoj de religioj opinias, ke ilia terura bildo montras la plej timigan aspekton de la senpersona, reganta super la mondo mistera forto. Pli poste, precipe dum modernismo, oni bildigis Meduzon kiel junan belan inon, kiu unuigis la danĝeran kruelon kun ina belo kaj ĉarmo. La plej fama sorĉistino, diino de Nokto, Hekate faris tre danĝerajn, fiajn sorĉojn. Pli multaj malbonaj sorĉistinoj la proverbo diras „Kie diablo ne scipovas – tien sendas virinon”. Antikvaj virinoj ofte mortigadis virojn kaj knabojn. Amazonoj sufokis siajn nov-naskitajn filojn. Idinoj de Danaos kaj loĝantinoj de insulo Lemnos

mortigis siajn edzojn.

En eksaj terkulturistaj socioj nuda knabino aŭ virino freneze dancanta ĉe laŭtaj krioj, korusaj kantoj kaj instrumenta ludo pelata trans kampoj post semado, instigadis al ago pigrajn kaj malviglajn post vintro diojn kaj idolojn de fekundo.

Virino en stato de ekstazo, ampleksita per furiozo partoprenantino de orgioj, dionize ebria, fortigadis potencon de la vivo, superabundon kaj fekundon de Naturo. Menadoj, bakhantinoj kaj religiaj prostituistinoj agis en multaj kulturoj por certigi al parencaĵoj bonan rikolton.

Virinoj ploregantaj kaj krientaj, por montri bedaŭron aŭ alvoki la animon de la mortinto el la ekstermondo – speciale dungataj pri plorantinoj estis simbolo de pento, orfeco, funebro kaj de aŭtuna kreskaĵ-velkado.

Virino pli ol viro taŭgis esti orakolo, profetino kaj sacerdotino. Famis Pitio de Delfoj, diversaj antikvaj sibiloj kaj vestaloj. En Germanio patrinoj de gentoj aŭguris, ĉu valoras riski batalon kontraŭ malamiko aŭ de ĝi rezigni. Ekzistis ne rare tutaj dinastioj de kart-divenulinoj, kabalistinoj, aŭguristinoj laŭ la manplato aŭ laŭ kristala globo. Ĝis nun pri kiromancio (aŭgurado laŭ linioj sur manplato) volonte okupiĝas ciganinoj. Konseviĝis interesa proverbo „Duflanke avino aŭguris”.

Virino posedanta 7 kapojn kaj 10 kornojn – babilona malĉastulino bildigis la paganan Romon de cezaroj kaj rolis en „Dia komedio” de Dante (Infero 19, 106-177), kie ŝi personigis Romon de papoj pekantaj per simonio, pro kio ili suferas aŭ suferos en infero.

Virino estas imago de la virineco, ina parto de la homa naturo, subtila Margareta, germana idealo „de la eterna virineco, kiu tiras nin supren” (Faŭsto, parto II, 12110-11 de Goethe).

Virino rolas kiel idealo, apoteozo de virto, moraleco, nimfo Egeria (edzino de Numo Pompilio), Beatrica de Dante, Laŭra de Petrarka, virino de erotikaj sonĝoj, virino de revoj, objekto de sopiro, sento, avido, amo; Helena de Trojo, la plej bela virino de la mondo, kiun Afrodita promesis al Pariso.

Bela virino estis enkorpiĝo de nobelularo, arto, ĉarmo, tento, intrigo, scio, nobleco. Virino – objekto de avido de sekrete observanta ŝin viro, kiel alegorio de Ĉasteco al kiu minacas Avido fariĝis ofta temo de bildoj kaj skulptaĵoj. „Suzana volis bani sin en horto, ĉar estis varme kaj estis tie neniu krom du olduloj, kiuj sin kaŝis, por ŝin rigardi” (Libro de Danielo 13, 15-16). „Davido promenis tra tegmento de la reĝa domo kaj ekvidis inon (Betsaban) banantan sin vid-al-vid, sur sia tegmento kaj ŝi estis de la granda belo” (2 Libro de Reĝoj 11, 2). Ĉasisto Akteono enirinte hazarde en groto ekvidis nudan Dianan kun nimfoj en bano (Metamorfozoj 3, 138-253 de Ovidio). Tajloro Tom en urbo Coventry observas trans fendo rajdantan nude Lady Godivan. Aplikata de ĉiam kaŝobservado de virinoj prenis institucian formon en dudeka jarcento, en kabaredoj kaj amuz-lokaloj, kie oni montras al publiko striptizon, dum kiu artistino dancante, gradon post grado senvestiĝas.

Virino fremda, nekonata, malpropra edzino prezentas sin kiel estaĵo danĝera. „Lipoj de la fremda virino likumas per mielo, ŝia buŝo estas pli glata ol olivoleo, sed fino estas amara kiel absinto kaj akra kiel glavo ambaŭtranĉa. Ŝiaj piedoj descendas al morto kaj ŝiaj paŝoj ĝisiras al abismo” (La Sentencoj de Salomono 5, 2-5).

Virino elpaŝas kiel allogantino, tentantino, *femme fatale* detruanta virojn, kiuj ŝin avidas. Sirenoj de la grekia mitologio, dunvirinoj kaj duonbirdoj, per magia kanto logis navigistojn al rifoj kaj kiam ili dronis – eltiradis ilin el la maro kaj suĉis ilian sangon (Odiseado 12, 154 de Homero). La samon faris fama nimfo de Rejno – Lorelei priskribita de kelkaj poetoj i.a. De H. Heine. Vampoj, virinoj de la demona belo obsedis virojn por alkonduki ilin al la perejo. Lanĉis ilin usonaj filmoj de antaŭ la dua mondmilito.

Virino kiel enkorpiĝo de troa babilemo kaj trudiĝemo estis priskribita de Sankta Paŭlo (1-a Letero al Timoteo 5,13). Junaj vidvinoj laŭ li estas „*Verbosae et curiosae*” (parolemaj kaj scivolemaj), parolas ĉiam tion, kio nebezonata.

Virino estas fonto de ŝakrado, komploto kaj intrigo. Ŝi estas ankaŭ kaŝa kaŭzo de la malklaraj aferoj. „*Cherchez la femme*”, se la kaŭzo de iu afero estas nevidebla. Virinon ofte direktas ruzeco, kolero kaj malico. „La plej granda kolero estas kolero de ino”, „Ĉian ruzecon oni povas elteni, sed ne virinan”, „Pli bone loĝi kun leono kaj kun drako ol kun malica virino” (Libro de Eklezjasto 25, 17-23). „Vi gardu vin kontraŭ ruzeco de virinoj” avertas libredo de E. Schikander al opero de Mozarto „La enŝorĉigita fluto”.

Esencaj ecoj de virino estas malstabilo, malfidelo kaj varieco. „*Varium et mutabile semper femina*” (La malstabila kaj varia estas ĉiam virino – Eneido 4, 569 de Vergilio). „*La donna è mobile* [...]” (Virino varias kiel plumeto dum vento – libredo de F.M. Piave al opero de Verdi Rigoletto). „*Così fan tutte*” (Tiel faras ĉiuj virinoj) t.e. ili malfidelas kaj kokras – konvinkas nin titolo de la ko-mika opero de Mozarto. Krom tio virino estas malforta kaj fragila. „Malforto, via nomo estas virino” rimarkas Ŝekspiro en dramo Hamleto (1, 2). „Virino, lanugo mizera, vi venta

estaĵo” skribas Mic-kiewicz en dramo Prauloj (parto IV, 960). La ĉina proverbo avertas „Animo de virino estas el hid-rargo, koro el vakso”.

Virgulino, fraŭlino estas en la arto simbolo de ĉasteco kaj de nerealigitaj ankoraŭ eblecoj. La kristanaj mistikuloj animon pretan akcepti Dion komparis al virgulino. Kiel la sesa signo de zodiako ŝi estas kunligita kun la Tero. Bildo de maljuna virino kunigas kun vintro. Maljuna virino de fabeloj kaj rakontoj senplumiganta anseron signifas la falantan neĝon. „Sinjorino Neĝblovado” el fabelo de Fratoj Grimm frapanta plumkovrilojn kaj kusenojn, el kiuj neĝas signifas zorgon de Naturo pri vegetaloj, kiujn la neĝo kovras kontraŭ frosto.

Interpretoj de sonĝoj pri virinoj estas jenaj:

- Virino en blanko – aŭguro aŭ antaŭseno de la morto
- Juna virino – kokro aŭ averto, ke financaj aferoj realiĝos reziste; eble ankaŭ iu preparas la trompon
- Esti en societo de virinoj – anonco de kverelo
- Simpatia kaj milda virino – bildo de la hejma zorganto – ebleco venki suferon kaj triston
- Esti virino – baldaŭa propono de bona posteno, avanco aŭ eĉ famo.

Lingvon de simboloj utiligas ne nur sonĝoj kaj mitoj. Pere de ĝi estas rakontata plimulto de fabeloj. Vaste konata fabelo pri la Ruĝa Kapuĉeto enhavas esencajn konsiderojn pri virino, viro kaj iliaj reciprokaj rilatoj. Ĝian simbolikon oni povas senpene kompreni. La kapuĉeto farita el ruĝa veluro estas simbolo de menstruo. La knabinego travivas la konfronton kun problemo de sekso. Averta de ŝia patrino „ne forlasu la arbaran padon, por vi ne falu kaj disrompu botelon kun vino por la avinjo” estas klara averto kontraŭ danĝero de la sekso kaj perdo de virgeco. Aperado de la knabinego en arbaro igas en la lupon seksan avidon, do li provas ŝin delogi. Li sugestas, por ke ŝi rigardu ĉirkaŭe, kiel bele kantas birdoj kaj floras floroj. La Ruĝa Kapuĉeto faras tion kaj pli kaj pli profunde eniras arbaron klarigante al si mem, ke fariĝas nenio malbona kaj la avinjo ĝojos ricevinte belan bukedon. Sed tiu devojiĝo de la virta pado tuj fruktas per la severa puno. La lupino transvestita en avinjon alglutas la knabinegon kaj satiginte la apetiton ekdormas.

Ĝis nun la fabelo traktas pri la simpla, moraliga motivo, danĝero de sekso. Sed ĝi estas pli komplikigita. Lupo-viro ĉi tie estas senkompata kaj ruza besto kaj la seksa kuniĝo aperas kiel akto de kanibalismo, dum kiu viro forvoras virinon. Virinoj ŝatantaj virojn kaj sekson ne konsentas kun tiu vidpunkto, sed en ĉi fabelo oni evidente rimarkas malamon kaj antipation al viroj. Supereco de virinoj apogas je kapablo naski infanojn. La fabelo ridigas la lupon, montras ke li provis elpaŝi kiel gravedigita virino, portante en la ventro vivajn estaĵojn. Kiam ĉasisto traŝanĉas la lupan ventron kaj liberigas avinon kaj nepinon – la Ruĝa Kapuĉeto enmetas tien ŝtonojn – simbolon de malfekundo. La faro de la lupino, konkorde kun primitiva leĝo de revenĝo, estis tuj punita – li falas kaj mortaĉas.

Ĉi fabelo, en kiu ĉefaj personoj estas tri generacioj de virinoj, atestas pri konflikto inter elementoj vira kaj virina; ĝi estas rakonto pri triumfo de malamantaj virojn virinoj finita per ilia venko.

Lidia Ligeza

Krakova Societo ESPERANTO

La programo de la renkontoj marte 2014 j.

- 6. 03.** – Lidia Ligeza. **Pri virino simbole**
- 13. 03.** – Anna Ramza-Kozioł. **Fragmentoj el “Sinjoro Tadeo” de A. Mickiewicz** (recitaĵo)
- 20. 03.** – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj**
- 27. 03.** – Andrzej Feuer. **La plej novaj mnemoteknikaj versaĵetoj**